nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2013

## TAGO DE ESPERANTO EN MADRIDO

Kiel ni anoncis en antaŭa numero de *Nia Voĉo*, la pasintan 15-an de decembro, Madrida Esperanto-Liceo organizis konferencon por festi la Tagon de Esperanto kaj samtempe la 125-an datrevenon de la naskiĝo de la lingvo. Ĝia titolo estis *"La valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno"*.

La konferenco disvolviĝis en la Centro Cultural Galileo, en la strato Galileo, numero 39, kaj ĝi estis malferma por la ĝenerala publiko. Bedaŭrinde, tamen, la ekstera efiko estis pli malgranda ol ni esperis, malgraŭ la dismetado de afiŝoj en diversaj lokoj de la urbo. Tial, parto de la matenaj programeroj, kiujn ni anoncis kiel hispanlingvajn, estis fine klarigitaj en Esperanto aŭ dulingve.




Ekstervice, Lupe montris al ni detalojn de la vojaĝo kiun ŝi kaj Carmen faris dum la lastaj semajnoj al Kubo. Poste, Ana Manero prezentis la Bitotekon de Hispana Esperanto-Federacio. Pedro Hernández parolis pri la uzo de Esperanto en la familia vivo.

Tagmeze, dekkvino da esperantistoj aliris proksiman restoracion, "La Posada de Fernando el Católico", por kune festeni kaj tosti je Zamenhof...

Vespere, Manolo Pancorbo montris kondiĉojn por ebla komunikado kun eksterteranoj. Ricardo Albert disvolvis diversajn aspektojn de la historio de la Ibera Duoninsulo dum la islamana regado. Poste, Jorge Camacho parolis pri sia poezio, kaj deklamis specimenon de siaj lastaj poeziaĵoj en la esperanta kaj la hispana lingvoj.

Fine, estis projekciata la dokumenta filmo "The universal language", en la angla kaj Esperanto kun hispanaj subtekstoj. Sekvis interesa kolokvo, en kiu oni diskutis ĉu la bildo de esperantistoj montrata en la filmo estas pozitiva kaj diskoniginda al ĝenerala publiko. Evidentiĝis ĝenerale ke aktivaj esperantistoj ne sentas sin trafe bildigataj en la filmo, dum eksteruloj montris pli pozitivan takson pri ĝi.

## VOJAĜO AL RUANDO

Fine de novembro kaj komence de decembro, dum dek tagoj, nia samideano Pedro Hernández vojaĝis al Ruando, kie li havis la okazon viziti ankaŭ la lokajn esperantistojn. Li verkis plurajn artikolojn pri tiu vojaĝo en sia blogo: http://www.ipernity.com/blog/pedroesperanto, kaj ankaŭ afiŝis kolekton de fotoj, pri lokoj kaj homoj de tiu lando.

Pedro ankaŭ sendis publikan alvokon pri tio, ke en la urbo Goma, Kongolando, ekzistas orfejo, estrata de esperantistoj, kiuj okupiĝas pri la nutrado kaj lernejigo de la infanoj, kaj krome instruas al ili Esperanton, kiel rimedo por komuniki kun la ekstera mondo. Dum sia vojaĝo tra Ruando, li renkontis responsulon, Alphonse Waseka, kiu rakontis ke, pro la malapero de la du homoj kiuj financis kaj la militstato, en kiu ili troviĝas, ili alfrontas grandajn problemojn por nutri kaj lernejigi la infanojn. La solaj enspezofontoj estas kantino kaj kokejo, kiuj donas tre nesufiĉajn enspezojn. Por bone elturniĝi, ili bezonus pligrandigi la kantinon kaj la kokejon, kaj ili taksas la projekton je ĉirkaŭ 6000 eŭroj. Pedro proponis al Alphonse kolekti monon, kaj por tiu celo li malfermis konton en Triodos Bank: 1491 0001 22 2042949723. Iu ajn kvanto estos bonvena, kaj Pedro garantias, ke 100% de la mono atingos la orfejon.

# nia voĉo januaro 2013

## EKSPOZICIO EN SAN FERMÍN

Jam estas montrata la ekspozicio de paneloj pri Esperanto en la gastejo (albergue juvenil) San Fermín, Avda. de los Fueros 36, metroo San Fermín-Orcasur. Ĝi restos dum tri aŭ kvar semajnoj, ĝis meze de januaro.

En tiu sama ejo okazos meze de marto la Iberia Renkontiĝo, nepre ĉeestenda. Informoj pri ĝi aperas jam en la retejo http://esperanto.es:8080/IberiaRenkontigho/.

## MUZIKA NOVAĴO

Jam disponeblas la unua albumo de ĥorensemblo Kvaropo Sinkopo, "*Bonvenon al la kongres*". Ĝi estis registrita koncerte dum la inaŭguro de la 71a Hispana Kongreso de Esperanto en Almagro, la 28an de aprilo de 2012. La registraĵo estas amatora, sed la rezulto sufiĉe bonas krom iom da fona bruo el la salono. La albumkovrilo baziĝas sur la oficiala kongresfoto.

Por ĝin aŭskulti aŭ elŝuti, iru al la retejo http://sinkopo.bandcamp.com/. La enpaĝa ludado estas senpaga kaj ankaŭ la deŝuto, kvankam eblas proponi alian prezon.

## KONGRESO DE SAT

En la paĝaro de SAT aperas fotoj de la kongresejo (universitata gastejo San Juan Evangelista): http://www.satesperanto.org/Bildaro.html. Ĉar la organizantoj devas antaŭpagi ioman sumon al la kongresejo, estas tre dezirinde ke tiuj, kiuj emas partopreni la kongreson, aliĝu kiel eble plej frue: http://www.satesperanto.org/Aligxilo.html

## VIZITOS NIN

Francia esperantisto, emeritino, Elisabeth Lambert, kun alia amikino, vizitos Madridon de la 1a ĝis la 4a de februaro. Ili serĉas gastiganton, kaj probable povos rendevui kun lokaj esperantistoj dum tiuj tagoj.

Komence de marto, Rudolf Fischer, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kaj lia edzino vizitos Hispanion, faronte rondvojaĝon kun turista grupo de Madrido al Andaluzio kaj reen. La 4an de marto ili alvenos, kaj la 5an ili havos liberan tagon en Madrido. Tre probable ni povos renkontiĝi kun li, verŝajne dum la lunda kunveno. Rudolf bone konas la movadon en Germanio, kaj krome li estas specialisto pri la Jakobaj vojoj en Hispanio, kiun ili vizitis plurfoje.

## ALIĜU AL MEL

Meritas la penon esti ano de Madrida Esperanto-Liceo. Nun, kiam finiĝas la jaro, pripensu, se vi ankoraŭ ne membras, ke aniĝo kaj kunlaboro en asocioj estas gravaj por la estonto de nia lingvo. La kotizo restas senŝanĝa: 12 eŭroj jare. Skribu al madrid@esperanto.es por (re)aliĝi.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º. La lundon 21an, Carmen kaj Lupe rakontos pri sia vojaĝo al Kubo.

La lundon 28an okazos la Ĝenerala Kunveno de MEL. La sekretario sendos al ĉiuj membroj la koncernajn dokumentojn.

Pro la jarkomenco, la ĉimonata sabata babilrondo okazos unu semajnon pli malfrue ol kutime, t.e. la 12-an de januaro, kiel kutime en la VIP'S de la "Kuboplaco", je la 17.30.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, en retejo http://www.esperanto.es/mel aŭ en forumo http://esperanto.creatuforo.com/


madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com